

Muŝflugilo



2022-08-06

EO: Karaj legantoj - En ĉi tiu malfrua numero de Muŝflugilo... nur unu en la redakto ne pigris, eblas legi pri alternativoj por uzi sociajn retojn tenante privatecon, pri nomoj kaj lingvopolitiko, pri nia plej ofta renkontiĝejo kaj pri kie kelkaj el ni estos la unuan semajnfino de setembro!

PT: Queridos leitores - Neste tardio número do Muŝflugilo... só um elemento da redação não teve preguiça, pode-se ler sobre alternativas para utilizar redes sociais e manter a privacidade, sobre nomes e política linguística, sobre o nosso local de encontro mais habitual e sobre onde alguns de nós vão estar em setembro!

ALTERNATIVAJ FASADOJ POR KONATAJ SOCIRETOJ

Se vi ofte sekvas enhavon ĉe YouTube, Twitter aŭ Instagram kaj ne interesas al vi produkti ajnan enhavon en tiujn retojn, vi povas ilin sekvi per pli liberaj kaj ne privatec-trudaj rimedoj.

Retejo <https://nitter.net> estas fasado por sekvi kontojn ĉe Twitter, sen ebligi al Twitter akapari informojn pri vi, kiel ekz. via geografia loko, kiun vi sekvas, ktp.

Retejo <https://bibliogram.art> samstile permesas al vi sekvi kontojn de Instagram sen neceso havi konton ĉe tiu firmao posedata de Meta (eks-Facebook).

Kaj, por sekvi enhavon de Google-posedata firmao YouTube, <https://invidious.io> estas je via dispono.

Ankaŭ <https://proxitok.herokuapp.com/> por TikTok.


Ĉiuj sistemoj havas plurajn spegulretejojn en pluraj landoj — ĉu por rapidigi disponigon ĉu pro tio ke la spekulatoj ne ŝatas tion, kion ili perceptas kiel trudon al siaj monenhavigaj rimedoj.

Samkiale, ne ĉiam la pluraj retejoj stabilas (ĉefe ĉar foje estas starigataj de individuoj), do indas sperti plurajn. Iel ajn, ĉiuj ebligas ke, volonte, vi mem gastigu vian filtrpaŝon al via celata socireto.

Nuno Magalhães



Invidious



NOMOJ

Post kiam mi translokiĝis al Portugalio, multe da homoj, kiuj vidas mian nomon Dzmitry, demandas: "Ĉu oni elparolas la [z] en via nomo?". Mi normale respondas "ambaŭ elparoladoj estas ĝustaj", sed la vera situacio estas pli kurioza. Mi volus rakonti pri ĝi.

En la teatraĵo "Ĉi-tie-anoj" de Janka Kupała, la rolulo adaptas tre aktive al la ŝanĝinta povo en Belarusio. Dum la Rusa imperio, li estas Nikitij Znosilov. Kial Belarusio estas en Pollando, li iĝas Nikiciucz Znosiowski. Kaj dum la Belarusa Popola Republiko, li estas Mikita Znosak. Tiu ĉi teatraĵo estis malpermesita nelonge post la publikiĝo en 1922, sed la situacio kun nomoj ne estas io rara. Fakte, oni tradukas nomojn (eĉ se Mikita iĝas Nikita en la ruse, ne Nikitij).

En mia naskiĝpruvilo, mia nomo estas skribita en la ukraina: Дмитро /Dmitro/ En mia pasporto, li estas skribita en la belarusa: Дзмітрый /Dźmitryj/, en la rusa: Дмитрий /Dmitrij/ En la rusa, belarusa kaj ukraina mi povas eligi la varianton senpense. Vi alparolis al mi en la rusa? Mi estas Dmitrij. En la ukraina? Dmitro mi estas. En la belarusa? Dźmitryj. Sed en aliaj lingvoj ne ekzistas kutiman varianton. Kiam mi skribas en aliaj lingvoj, aparte skribitaj en la latina alfabeto, mi ĉiam eligas varianton. Ĉu hodiaŭ mi volas ŝajni pli ukraina, pli belarusa aŭ kaŝi sin per la plej disvastigita rusa varianto? Mi decidas tion ĉi kiam mi en ĉiu nova grupo de homoj.

La situacio havas historiajn kaj politikajn kialojn. Dum longe Belarusio kaj Ukrainio apartenis al Rusio, kaj la povo provis rusiigi belarusojn kaj ukrainojn. Do, oni trovis (aŭ kreis) tradukaĵojn al ĉiuj nomoj. Tiamaniere, kial vi parolos en la rusa pri Belarusio aŭ Ukrainio, vi ofte ne aŭdus nek unu nerusan nomon.

Oni faris tion por subteni iluzion, ke belarusaj kaj ukrainoj estas nur varianto de rusoj, por pravigi imperismon. Tiu estas forta iluzio: ĝi travivis dum jarcentoj. Putin, komencante la milito, diris pri tiu ĉi ideo.

La situacio kun aliaj lingvoj estas ankaŭ kurioza. En la belarusa, rusa kaj ukraina oni tradukas ĉion, por nei la malsameco. Ĉiuj estas la sama. Por la tatara, la tradukado kreas hierarĥion: tataroj devas adaptigi sian nomon en la rusa, sed rusoj ne devas adaptigi sian nomon en la tatara. La cirilalfabeta ortografio de tatara enhavas ĉiuj rusaj leteroj por faciligi pruntado de vortoj de la rusa: do, Дмитрий /Dmitrij/ en la rusa estas Дмитрий /Dmitrij/ en la tatara. Sed la rusa ne havas tatarajn leterojn. Do, Зөлфия /Zölfiä/ en la tatara estas Зулфия /Zul'fiya/ en la rusa. Tataroj devas adaptiĝi por rusoj, sed rusoj ne devas adaptiĝi por tataroj.

Tiu kreas la iluzio, ke la rusa kulturo estas 'internacia', 'monda', utila al ĉiuj; kaj la tatara kulturo devas esti adaptita.

Fakte, tataroj volis ŝanĝi sian ortografion en 1999. Li kreis la novan latinalfabetan ortografion, kiu malaperigus tiun ĉi hierarĥion. Sed Tatarstano estas parto de Rusio, kaj post nelonge la Parlamento de Rusio malpermesis lingvojn en Rusio uzi latinan alfabeton. (Kaj, nature, la plimulto da parlamentanoj tute ne parolis la tataran. Sed ili decidis, kiel oni devas skribi ĝin.)

Do, la situacio kun nomoj en malsamaj lingvoj povas diri multe pri la historio, politiko k.t.p.

Dmitro Kuŝnaroŭ



Redakcio: Ana, Brandon, Dmitro, Nuno, Roger kaj Xana (dume)

Kontakto: esperantoporto@gmail.com

MUŜFLUGILO

Asa da Mosca (Muŝflugilo) estas kafejo en la kvartalo Bonfim de Oporto. Ĝi estas unu el tiaj tradiciaj renkontiĝejoj kie oni interkonsentas por kunveni kun konatoj kaj amikoj, en ĝi ofte kafumas lokanoj, turistoj, pseŭdoalternativuloj, artistoj el proksima Belarta fakultato kaj ankaŭ esperantistoj kiuj de 2018, post la unua kurso de esperanto en UNICEPE, ekkunvenis tie. Nun ankaŭ estas la oficiala redaktejo de ĉi tiu flugfolio, pri la origino de la nomo estas du mitoj laŭ unu el ili temas pri movo en pokero kaj la alia pri la nomo de fama brando de la epoko kiam Asa da Mosca malfermiĝis. Se vi ĝin vizitas bonvole antentu la muron ĉee la verŝotablo kie MF estas afiksita!

Roger Prieto



ANTAŬEN

Inter la 2a kaj la 4a de setembro, kelkaj membroj de la redaktejo de Muŝflugilo estos em Amora, Seixal, por tie partopreni en la ĉiujara festo de PCP (portugala komunista partio), Avante (antaŭen).

Malkiel kutime, ni ne renkontiĝos en Muŝflugilo la unuan semajnfino de tiu monato, sed tamen renkontiĝos. Se vi mem volas partopreni la feston kun aliaj esperantistoj bonvole kontaktu la redaktejon de Muŝflugilo, se vi emas kunveni kun ni virtuale, eblos tion fari je 17:00 la 3an de setembro per la ligilo <https://meet.jit.si/AvanteEO2022>.

Xana

Aprenada esperanto:

Online - www.kurso.com.br

Presencialmente (Porto) - www.unicepe.pt